


# KONTAKTO

numero 140 (1994:2)

**Futbala Mondpokalo:  
ek al Usono!**



© 1992 WC'94/ISL

facila ĉefartikolo:

ni  
parolu pri  
la



- Insektomanĝaj floroj
- **tentaklo** bolas!
- Infanoj en milito
- Lasta ĉapitro de *Lalande*
- Kiel retrovi perditajojn laŭ kuba recepto



Ek al Usono!	Joĉjo Truong, Usono	2
Ni parolu pri la vivo	Intervjuo de Joĉjo Truong, Usono	4
La listo de Schindler	Georgo Kamaĉo, Hispanio	6
Satanaj proverboj (2-a parto)	Bernard Golden, Hungario	7
La angulo de Ludmila kaj Petro	Ludmila kaj Piotr Maliccy, Pollando	8
Insektomanĝaj floroj	Remigiusz Mielcarek, Kanado	8
Ĉu vi jam pendigis Dimason?	Alberto García Fumero, Kubo	9
La superulo	Claude Piron, Svislando	10
Lalande (7-a, lasta parto)	Flávio M. Carneiro, Brazilo	12
Tentaklo		14
Mi sonĝas pri paco	Nada Šimić, Kroatio	15
Infanoj en milito: nova etika bezono		16

## KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 140 (1994:2), 31a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;

☎ +31 10 436 10 44;

☎ fakso +31 10 436 17 51

e-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Martin Burkert (Germanio)

Flávio Martins Carneiro (Brazilo)

Zoran Ćirić (Serbio)

Alberto García Fumero (Kubo)

Bernard Golden (Hungario)

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Ludmila kaj Piotr Maliccy (Pollando)

Remigiusz Mielcarek (Kanado)

Oshó-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)

Claude Piron (Svislando)

Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)

Izabel Santiago (Nederlando)

Jozef Truong (Usono)

Ilkka Santtila (Finnlando)

Sabira Ståhlberg (Germanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy

Provlegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facillingvaj artikoloj estas verkitaĵaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifo:

Tutpaĝa 675 gld., Duonpaĝa 375 gld.,

Kvaronpaĝa 205 gld., Sesonpaĝa 155

gld. Okonpaĝa 110 gld. Eksterakovrilaj

anoncoj kostas double. Senŝanĝe

ripetita anonco (ne anonceto!) en

sinskvaj numeroj rajtas je rabato de

20%. Por movadaj instancoj: 50%


rabato. Varbantoj de ekstermovadaj

anoncoj ricevas maklerajon de 30% el

la prezo de la koncerna anonco. La

abontarifo varias laŭlande. Petu

informojn de la supra adreso.



## enkonduko

Mi havas bonan novaĵon: KONTAKTO ne malaperos! La estraro de UEA, kiu kunsidis fine de marto, estis tre kontenta pri la kresko de abononj al nia tridekjarulĉjo. Iom post iom malkreskas la deficiĉto kaj ĉi-jare ni eĉ ne plu havos ĝin. Dankon al vi ĉiuj, kiuj abonas kaj abonigas al KONTAKTO! Kaj certe ne pensu, ke nia kampanjo nun finiĝis! PIV ankoraŭ ne estas lotumita...

Apartan laŭdon al Kataluna Esperanto-Asocio, kiu faris belegan kolektivajn abonon por 185 membroj! Rebonvenon al preskaŭ 200 junaj togolandanoj, kiuj pro malfeliĉaj enlandaj cirkonstancoj devis malhavi nian revuon pasintjare.

La tajpemulo surkovrila estas Joĉjo Truong, unu el niaj plej produktivaj kunlaborantoj (vi konstatos tion ĉi-numere).

Lian foton faris Jeremy Ganse.

Kaj adiaŭo al Lalande.

Sep magiajn dankojn al Flávio Martins Carneiro kaj Izabel Santiago, kiuj tra 7 numeroj donacis al ni la eskvizitan akompanion de Xie Kitchin.

Ĝis la venonta!

*Francjo*

# Ek al Usono!




**Dum la lastaj jaroj Usono sin pretigas por gastigi la mondon kaj la plej gravan sportan eventon sur la Tero: la Futbalan Mondpokalon.**

La Organiza Komitato de la Mondpokalo (WCOC) taksas, ke pli ol 1 miliono da homoj venos al Usono por spekti kaj ĝui tiun unikan konkurson. Laŭ ĝi, la tutmonata evento donos al la usona ekonomio per biletoj, vizitantoj, televidaj rajtoj kaj memoraroj, almenaŭ 4 miliardojn da dolaroj (aŭ 7 000 000 000 da guldenoj!).

La matĉoj okazos diverstempe en naŭ urboj: Bostono, Ĉikago, Dalaso, Detrojto, Los-Anĝeleso, Nov-Jorko, Orlando, San-Francisko kaj Vaŝingtono D.C. La Mondpokalo komenciĝos per la malferma ceremonio kaj la unua ekscita matĉo en Ĉikago la 17-an de junio kaj finiĝos unu monaton poste, la 17-an de julio, per la finalo en Los-Anĝeleso.

Ĉio ĉi komenciĝis antaŭ sep jaroj, en 1987, kiam la Usona Futbala Federacio (USSF) decidis gastigi la Mondpokalon de 1994 en Usono. Poste, la estraro de USSF oficiale



**Mi estas Pelé (1971).** El la portugala tradukis F. Almada. 164p. Ilustrita. 24cm. Aŭtobiografio de Edson Arantes do Nascimento "Pelé", la mondfama futbalreĝo el Brazilo. Prezo: 11,40 gld.

faris la peton al Federacio Internacia de Futbal-Asocioj (FIFA). Pli ol unu jaron poste, la 4-an de julio 1988, la vic-prezidanto de FIFA, Harry Cavan anoncis, ke Usono rajtas okazigi ĝin. Usono ricevis 10 estrarajn voĉojn, dum Maroko ricevis 7 kaj Brazilo 2. Ekde tiam WCOC aktive preparis ĉion por certigi, ke la 15-a Mondpokalo estu la plej granda ĝis nun. Kiel oni povas imagi, tio ne estas facila tasko.

Alan Rothenberg, la ĉefestro de WCOC, diris: "Estis la 4-a de julio, kiam ĉio komenciĝis, kiam FIFA donis la Mondpokalon al la Usona Futbala Federacio. Laboris por la Federacio tiam plejparte volontuloj; ĝi havis malmulte da mono, kaj la Organiza Komitato ankoraŭ estis kreota. Ni havis neniom da mono, neniujn dungitojn kaj neniujn oficejon. Nun ni havas 175 tuttempajn laborantojn ĉe la Organiza Komitato, kaj milojn da volontuloj. Ni nin financas dank' al diversaj komercaj rilatoj kaj al la vendado de biletoj. Nia ĉefsidejo estas tuta etaĝo de altega konstruaĵo, kaj ni havas lokon ankaŭ sur du aliaj etaĝoj... Kiam la Mondpokalo komenciĝos, ni havos 250 tuttempajn laborantojn kaj 25 000 volontulojn laborantajn por subteni ĉi tiun mirindan eventon."

Krom organizi la matĉojn, WCOC ankaŭ celas per la konkursego montri pli aktualan flankon de futbalo en Usono. Usono estas konata tutmonde pro sia "malinteresigo" pri futbalo kompare kun aliaj landoj. Tamen, tiu bildo eble ŝanĝiĝos, ĉar la futbala movado rapide kreskas en Usono. Laŭ WCOC, futbalo nun estas la dua plej ludata sporto de usonaj junuloj (post korbopilko).

Aldone, la WCOC ankaŭ intencas okazigi diversajn kulturajn programojn. Unu el la plej grandiozaj ideoj estas SoccerFest (Futbala Festivalo), kie vizitantoj povos ĝui la internacian etoson de la Mondpokalo pere de internaciaj manĝaĵoj, kulturaj aranĝoj, edukaj ekspozicioj, ludoj kaj tiel plu. Oni konstruos du grandegajn parkojn - unu en Ĉikago kaj la alian en Los-Anĝeleso. La organizantoj antaŭvidas, ke pli ol 300 000 vizitantoj venos al ambaŭ festivaloj.

Sendube, la Mondpokalo estos la plej fama sporta okazaĵo en la tuta mondo: 1,06 miliardoj da homoj tutmonde televidis la finalon de la Mondpokalo en 1990; entute, 26,7 miliardoj televidis la matĉojn de tiu Mondpokalo. Krome, teamoj el pli ol

## Partoprenu!

La Usona Esperantista Junularo - USEJ invitas vin partopreni en la Mondpokalo! Por tio vi nur devas respondi ĝuste al jenaj demandoj. Ni lotumos 5 belegajn memorarĵojn pri la Mondpokalo. La demandoj estas tiel bazaj, ke eĉ se vi ne estas futbal-fanatikulo vi povas trafte respondi... kaj gajni!


1. En kiu lando okazis la Futbala Mondpokalo de 1990?
2. Kie okazis la unua Mondpokalo en 1930?
3. Tri landoj ĝis nun gajnis la pokalon po trifoje. Nor:u almenaŭ du el tiuj landoj.
4. En kiu lando okazos la 1998-a Mondpokalo?
5. Kiu lando sukcesis ludi en ĉiu Mondpokalo?

Sendu vian respondon al: USEJ, 624 Second Street, Lancaster PA 17603-5114, Usono. Limdato estas la 23-a julio 1994, do agu tuj!

# Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

**KSTAKTO** estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn: en tre facila lingvo, tiel ke **KSTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1994 **KSTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



### ABONTARIFO 1994

Aŭstralio	30 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	145 kronoj
Belgio	755 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	19 guldenoj
Brazilo	19 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugaliao	2300 eskudoj
Britio	14 pundoj	Italio	29000 liroj	Svedio	160 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	27 dolaroj	Usono	21 dolaroj

Abonu antaŭ la fino de junio kaj vi partoprenos lotumadon de Plena Ilustrita Vortaro!

140 landoj — la plej granda nombro ĝis nun — ludis en 500 kontinentaj matĉoj por ricevi la ŝancon veni al Usono.

El tiuj teamoj nur 24 povos partopreni la ludojn. Krom el Usono (kiu, kiel la gastiganta lando, aŭtomate akceptiĝis) kaj Germanio (aŭtomate akceptita kiel gajninto de la antaŭa Mondpokalo), venos teamoj el Argentino, Belgio, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Grekio, Hispanio, Irlando, Italio, Kamerunio, Kolombio, Meksikio, Nederlando, Niĝerio, Norvegio, Maroko, Rumanio, Rusio, Saudi-Arabio, Sud-Koreio, Svedio kaj Svislando.

Estas interese noti la diversecon de la teamoj ĉi-jare. Dum mankas tiu el Anglio (tradicie unu el la plej bonaj teamoj) kaj Danlando (la Eŭropa Ĉampiono), venos Bolivio (kiu laste ludis en la 1950-aj) kaj Grekio (kiu neniam antaŭe konkursis pri la Mondpokalo).

Por bonvenigi la teamojn kaj la vizitantojn al Usono, WCOC prezentis kiel dorlotbeston hundon nomitan "Striker" (elp. *strajkr*), Frapanto. La hundeto, desegnita de la Warner Brother Animation Studios "naskiĝis" en januaro 1992. Tamen, ĝi restis sennoma ĝis oktobro, kiam WCOC okazigis konkurson por bapti la hundon. Pli ol 25 000 usonanoj voĉdonis. Laŭ WCOC, la hundeto "represas la junecon, vigecon kaj ekscitecon de futbalo en Usono kaj ankaŭ en la aliaj 178 membroj de FIFA".

La oficiala emblemo de la Mondpokalo montras leviĝantan bluan pilkon super ruĝaj kaj blankaj ondoj, sugestante la usonan flagon. Ĝi estis kreita de Pentagram Design, internacie konata desegna korporacio en Novjorko, gajninto de tutjara konkurso por trovi taŭgan simbolon por la Mondpokalo.

La devizo de la Mondpokalo ĉi-jare estas "Fari Futbalan Historion". Vidante la ĝisnunan laboron de WCOC ne estas dubo, ke la Mondpokalo de 1994 sukcesos pri tio. □

(Dankon al Guido Tognoni de FIFA kaj Valerie Steiner kaj Jim Trekker de WCOC pro ilia helpo en la pretigo de tiu ĉi artikolo).



## **Kio estas plej grava en la vivo de usonaj gejunuloj hodiaŭ? Kial?**

**Maria:** Mi dirus, ke nuntempe lernado estas la plej grava, ĉar nur tiel ni povos atingi ion. Ĉio funkcias ĉirkaŭ la lernejo. Ni devas fari niajn proprajn aferojn aŭ antaŭ aŭ post la lernotago. Nia vivo pli-malpli ekzistas ĉirkaŭ la lernejo. (La aliaj konsentas).

## **... Kaj la plej granda problemoj?**

**Maria:** Mi opinias, ke la ĉefa problemoj estas tro multe da premo kaj la devo fari decidojn. Estas premo ĉie ĉirkaŭ ni. Plenaĝuloj senĉese diras al ni: "Zorgu vin", "Diru *ne* al narkotaĵoj\*", "Diru *ne* al seksumado\*", "Maltrafu malsanojn"...

**Megan R.:** Plenaĝuloj puŝas ĉion sur nin. Ili diras al ni, kio estas ĝusta kaj kio ne, sen permesi al ni mem decidi.

**Mike:** Perforto\*, ĉar tio estas la bazo de ĉio malbona. Ĉiu bezonas kompreni kaj estimi unu la alian.

**Maria:** ... respekti\* unu la alian.

**John:** Ĉiu estas tro necerta pri si mem, do oni sentas, ke oni devas iel sin pruvi\* forta.

**Maria:** Jen alia ekzemplo: homoj tro rapide diras: "Ne, vi malpravas!", kaj tuj komencas ataki, batali kontraŭ la alia.

## **Ĉu ekzistas solvoj por tiuj ĉi problemoj?**

**Beth:** Nu, ne ekzistus tiuj problemoj se ni konus la solvojn.

**Maria:** Mi pensas, ke ni povas subteni unu la alian ĉar ĉiu el ni estas sur la sama ŝipo. Paroli kun amikoj ĉiam helpas min multe.

## **La 80-aj jaroj estis la "Mi-jardeko" en Usono. Kiel devus nomiĝi la 90-aj jaroj?**

**Mike:** La jardeko de koncerno pri la medio.

**Maria:** Mi respondus "Jardeko de ŝanĝoj", ĉar ni nun laboras por helpi la medion, pri ĉasteco\* kiu estas granda ŝanĝo por plejparto de la homoj...

**Alyssa:** Estas jardeko de polemiko\*.

**Maria:** Kaj, bedaŭrinde, ankaŭ jardeko de militoj.

## **Kion vi opinias pri la stato de la mondo?**

**Maria:** Mi opinias, ke ĝi komencas pliboniĝi. La aferoj estis malbonaj kaj ni bezonas ŝanĝojn. Nun ni pasas tra malfacilaj tempoj, sed mi opinias, ke multaj muroj ekfalas. Mi pensas, ke la mondo estas ŝanĝiganta en pozitiva\* direkto.

**Mike:** Pli kaj pli da homoj fariĝas respondecaj. Ili klopodas helpi solvi la problemojn.

**John:** Pli-malpli, la mondo ekpliboniĝas. Tamen, tiam ni vidas aferojn similajn al la milito en eksa Jugoslavio, kiu memorigas nin, ke ankoraŭ ekzistas la sango-soifa kontraŭemo, kiu daŭras jam jarcentojn kaj plu iras forta. Homoj mortigas unu la alian sen iu kialo, simple ĉar iliaj gepatroj estis koleraj kaj iliaj geavoj estis koleraj.

**Mike:** Mankas respekto por aliaj homoj.


**Megan R.:** Nu, mi opinias, ke nun estas militoj, en la pasinteco estis militoj, kaj ankoraŭ estos militoj en la estonteco. Estus bonege revii\* pri mondopaco, sed estas iom malfacile

# ni parolu

nun. Mi vere ne sentas, ke okazos tiom multe da fortaj ŝanĝoj.

## **Kiuj estas viaj celoj?**

**Deb:** Mia celo estas studi la kuracistan fakon kaj, diplominte\*, fariĝi ano de la Paca Korpuso\* aŭ simila organizaĵo por helpi homojn sin helpi.



**Intervjuis kaj elangligis Joĉjo Truong, Usono**

**Fotis Jeremy Ganse**

**Kion usonaj gejunuloj opinias  
pri la vivo? La demandon  
respondis diversaj 16- kaj 17-jaraj  
gimnaziaj\* lernantoj el Lancaster,  
mezgranda urbo en nordorienta Usono.  
Ili estas**

**Jim Crocamo,  
Mike Gallagher,  
Deb Jakielski,  
John Justice,  
Alyssa Morell,  
Beth Peterson,  
Megan Rippon,  
Maria Wickenheiser  
kaj Megan Wike.\***

**Steph Cappy  
(maldekstre) tre  
amuziĝas pri la unuaj  
opinioj de Jere Cassidy.  
Do li preferis halti.**

**Jim:** Mi preferus laboron, kie mi estu pagata ne nur pro mia laboro, sed ankaŭ pro propraj, mem-proponaj agoj; ekzemple socia laboro aŭ sciigi pri gravaj temoj per artaĵoj plaĉus al mi.

\* Elparolu: ĝim krokamoŭ, majk galagr, deb ĝakilski, ĝon ĝustis, alisa morel, bet pitersn, megn ripn, maria ŭikenhajzr kaj megn ŭajk.



facila

pri

Ĉu eble tiel ĉi (de maldekstre dekstren) Mike, Deb, Joĉjo kaj John rigardos sin en KONTAKTO?



Jeremy ne tro opiniis... Verdire, estas tiel multe pli amuze foti!



Rideteme aŭskultas (de maldekstre dekstren) Beth, Maria kaj la jam renkontitaj Mike kaj Deb.

**Alyssa:** Nu, la sola celo, kiun mi povas elpensi nun estas, ke mi volas esti kiel eble plej sendependa\* post mia diplomiĝo.

**Megan W.:** Por mi ne ekzistas pli grava laboro ol kreskigi infanojn, kiuj formas la mondon. Jes, mi intencas fariĝi dommastrino.

**Mike:** Mi volus fariĝi instruisto aŭ konsilisto de lernantoj, ĉar plaĉas al mi kunlabori kaj helpi aliajn homojn.

**Kiam temas pri laboro, kio plej gravas? Ĉu havi bonan oficejon kun alta salajro, senti sin feliĉa, aŭ esti sukcesa...? Kio?**

**Deb:** Plej gravas al mi feliĉigi aliajn homojn.

**Maria:** Nu, ĉiuj diras "ho, mi preferus esti feliĉa". Tamen, venos tempo, kiam oni devos pensi pli kaj pli pri mono. Ekzemple kiam oni ricevas infanojn. Tiam oni volas aĉeti ĉion, kion oni bezonas.

**Mike:** Mi antaŭe laboris ĉe iu loko, kiun mi vere malamis kaj sekve mi estis malfeliĉa. Tamen, la salajro estis bona. Nun mi laboras ĉe loko, kie la salajro estas aĉa sed mi amas la laboron kaj sentas min pli feliĉa.

**Beth:** Ankaŭ mi amas mian laboron. Mi konas plurajn junulojn, kiuj ricevas pli da mono ol mi. Kelkfoje mi preferus labori aliloke. Ĉe ni estas malkreskigo de salajroj. Jam dufoje mi devis ricevi salajran plialtigon, sed venis nenio. Tamen, mi ne forlasus mian laboron ĉar mi amas ĝin tiel multe.

**Kiom sendependaj vi estas?**

**Mike:** Mi sentas, ke mi kaj miaj gepatroj havas bonegan rilaton. Ni povas interparoli pri ĉio; ili permesas fari kion ajn mi volas. Ili konsilas, tamen lasas min libere agi. Ili enmiksiĝas nur kiam necesas.

**John:** Mi opinias, ke mi estas sufiĉe sendependa. Mi ne havas revenhoron kaj rajtas elekti miajn lerneajn kursojn. Ne ekzistas ia premo flanke de miaj gepatroj. Kaj, ĉar tiuj kursoj rilatas al mia estonteco, mi mem devas decidi. Iusence, mi havas pli da respondeco tiel.

**Beth:** Mi opinias, ke mi estas kiel eble plej sendependa se konsideri, ke 16-jarulo ankoraŭ devas vivi kun siaj gepatroj, aŭskulti ilin kaj tiel plu. Ekzemple, fininte la lernotagon mi mem stiras\* kaj aĉetas mian vespermanĝon, iras al mia laborejo, poste hejmen kaj faras miajn hejmtaskojn. Estas mia perdo, se mi ne faras kion mi devas. Miaj gepatroj helpas min, sed ne gvidas min paŝon post paŝo tra la ĉiutaga vivo.

**Deb:** Mi konsentas kun Beth. Miaj gepatroj permesas al mi preni pli kaj pli grandajn decidojn nun. Ili donas al mi pli da respondeco. Ili fidas\*, ke mi faras la ĝustajn elektojn.

**Megan R.:** Nu, se ni estus tute sendependaj, tiam plejparto el ni ne estus ĉi tie nun. Niaj gepatroj pagas multe por ke ni vizitu ĉi tiun lernejon. Kaj multajn aliajn aferojn ili pagas por ni. Se ili forprenus ĉion ni havus preskaŭ nenion.

**Ĉu vi opinias, ke plejparto de la usonaj gejunuloj estas sendependa?**

**Maria:** Kiam temas pri aĵoj, mi opinias, ke ne, ĉar iliaj gepatroj pagas por ĉio. Tamen, kiam temas pri respondeco, decidoj kaj aliaj ili ja estas sendependaj.

**John:** Ni ne vivas ekster la mondo!

**Mike:** Mi opinias, ke ni, gejunuloj, spertas pli multon nun. Kaj eble tial ni elektas pli saĝe nun.

**Kiel vi priskribus usonajn gejunulojn?**

**Maria:** Ili ŝatas bone pasigi la tempon.

**Megan R.:** Ili estas konfuzitaj\* pri decidoj en sia vivo, kiun vojo preni... pri ĉio!


**Mike:** Ili estas tre sci-volaj kaj aktivaj. Ili klopodas helpi pli.

**Kion vi dirus al ali-landaj gejunuloj?**

**Mike:** Vi devas loĝi ĉi tie kaj mem sperti la landon antaŭ ol komenci ĝin pri-juĝi.

**Alyssa:** Malfermiĝu kaj ekspertu novajn aferojn.

**Megan W.:** Kaj vizitu Pensilvanion! "Vi havas amikojn en Pensilvanio!" (Tio estas la frapfrazo de la Pensilvania Turisma Ŝtat-Oficejo!). □



**Vian opinion atendas:**

Mr. Mann's Class,  
p/a Jozef Truong,  
624 Second Street,  
Lancaster PA 17603-5114,  
Usono

**\*Paca Korpuso:** programo fondita de John Kennedy, per kiu usonaj volontuloj helpas en la Tria Mondo  
**sen-de-penda:** mem-stara.

**diplomiĝi:** ricevi diplomon (= papero pri finstudado)  
**ĉasteco:** ne-seksum-eco  
**fidi:** senti sekurecon pri io aŭ iu  
**gimnazio:** mezlernejo

**perforto:** fi-uzo de forto por devigi iun fari ion  
**polemiko:** diskutado, ide-kontraŭado  
**pozitiva:** jesa

**respekti:** konsideri kaj estimi  
**revi:** deziregi  
**salajro:** labor-pago  
**stiri:** mem direkti veturilon  
**seksumi:** kontakti sekse



Ami kinon:

# La listo de Schindler

Origina titolo: *Schindler's list*  
(Usono, 1993)

Reĝisoro: Steven Spielberg  
Skripto: Steven Zaillian  
Ĉefroluloj: Liam Neeson,  
Ben Kingsley,  
Ralph Fiennes,  
Embeth Davidtz

Mi ekverkas ĉi recenzon en la mateno de la 22-a de marto, kiam mi ankoraŭ ne scias pri la aljuĝo de oskaroj en Holivudo la antaŭan nokton. Ĉar, verdire, mal-kiel Irina Alekseeva [vd. *TENTAKLO en KONTAKTO* 139 1994:1], mi fajfas pri oskaroj. Kial? Simple tial, ke nur malofte ili koncernas la kvaliton de filmo aŭ la talenton de reĝisoro aŭ aktoro; prefere ili celas la flankon merkatan, negocan, monan de la kino-industrio, en kio mi ne trovas multon interesan.


Probable la lastan filmon de Steven Spielberg premios/premiis tuta oskar-amaso. Povus tamen okazi la malo, surprize por ĉiuj, kiel siatempe al la atentinda *La elefant-homo*, de David Linch... kaj mi same plu fajfus pri la afero. Mi ripetas: ĉiu-jare estas filmoj, kiuj malgraŭ siaj meritoj ricevas nul oskaron, kaj aliaj, kiuj senmerite akaparas ilin.

Spektante la dekomenca faman *La listo de Schindler* mi iom timis, ke refoje Spielberg, kiel senescepte dum la lastaj jaroj, produktis ne artaĵon, sed plian konsum-varon, kun naziaj oficioj anstataŭ dinosaŭroj. Sed mi eraris.

Krei filmon pri la nazia tempo, pri la murdado de ses milionoj da judoj (inter multaj aliaj viktimoj, ekzemple ciganoj, handikapuloj kaj gejoj), certe ne facilas. Konser- viĝas arĥivaj filmaj fare de nazioj mem, kiuj montras la hororan realon de la nazia reĝimo de 1933 ĝis 1945. Tamen eblas, per lerta munt-kombino de ĉi tiu kaj alia materialoj, produkti frostigajn dokument-filmojn, kiel la tri-ĉapitra *De Nurembergo al Nurembergo*,

de Frederic Rossif, aliranta la temon per eminenta resumo de la dua militego, aŭ kiel *La arĥitekturo de naziismo*, de Peter Cohen, kies analizo de la hitlerisma bel-kulto (kun la aspiro beligi la mondon pere de violento) evidentiĝas la samcepele de la streboj elimini la *degeneritan arton* (*Entartete Kunst*) kaj ekstermi la judan popolon.

Des pli malfacilas akcepti la tem-defion per art-filmo (ne preciza termino, ĉar ankaŭ bona dokumenta filmo, kiel bona eseo, nepre estas art-verko). Tion sukcesis ekzemple *La falo de la dioj*, de Luchino Visconti, per prezento de la rilatoj de tri generacioj de unu sama germana familio kun la naci-socialistoj, aŭ la lastatempa *Eŭropo* (kiun Irina Alekseeva certe opinias jam malnova), de Lars



Von Trier, pritraktanta la pluan postmilitan aktivadon de nur ŝajne eksaj svastikuloj.

Ankaŭ *La listo de Schindler* sukcesas. Surbaze de biografia romano verkita de Thomas Kenneally, Spielberg rakontas al ni la historion de Oskar Schindler (1908-1974), germana industriisto kiu ekde 1939 laborigis judojn en sia fabriko de emajlitaj metal-potoj en Krakovo, kaj kiu, por evitigi la aplikon de *la fina solvo de la juda problemo* (t.e. ke oni gasumu ilin en koncentrejo), per la mono de sia firmao *elaĉetis* 1200 judojn al nova (kaj parte falsa) grenad-fabriko en sia deven-regiono, ĉe la montaro Sudetoj, kio iom post iom finance ruinigis lin. Tial post la milito lin vivtenis la *ŝindleraj judoj*, sed tio estas afero aparta, kiun la filmo ne inkludas.

Ne restas tute klare, ĉu en la komenco Oskar Schindler havis alian motivaĵon por tiel agi krom la

eblo enspezi monon pli rapide kaj facile ene de la korupta, kaj do subaĉetebla, nazia sistemo. Kelkaj kritikistoj plendas, ke Schindler estis tro mon-avida, hedonisma kaj jupo-ĉasa; mi trovas en tio nenion kritikindan, se konsideri, ke perfektaj homoj ne ekzistas, kaj ke per tio li al neniu malutilis kaj neniu damaĝis; parenteze, mi tre emas konsenti kun hedonismo (kiel skribis Ferenc Szilágyi, "*La vivo estas efemera kaj estas maljuste aranĝi tiun efemercon kvazaŭ oni vivus eterne*").

Malpli komprenebla restas la definitiva ŝanĝiĝo en la sinteno kaj volo de Schindler, kaj ties kaŭzo: ĉu la senjudigo de la krakova geto<sup>1</sup>, aŭ ĉu (kiel sugestas Joan de Sagarra en la marta numero de la katalunlingva revuo *El temps*) ĉar li havis filon kun juna pola judino, kiujn la nazioj kune fusilumis en la pola urbo Bilicz en 1940? Laŭ Sagarra nek la filmo nek la biografio de Kenneally mencias ĉi fakton.

Aliaj kritikistoj, ke Spielberg elektis por la ĉefa rolo ne judan viktimojn aŭ svastikan kanibalon, sed *bonan* germanon, anon de la nazia partio eĉ. Nur persono kun ĵaluza aŭ envia pensemo povas tion aserti; la agojn de Oskar Schindler, Heinrich Himmler, Steven Spielberg aŭ Baruch Goldstein ne mildigas aŭ gravigas la fakto, ke temas pri germano, judo, cigano aŭ sennaciulo. Aplaudindas ke Spielberg, cetere usona judo, montras al ni la holokaŭst<sup>2</sup> tra la prismo de Schindler, per la figuroj de la 1200 judoj, kiujn li liberigis de morto en gaskameroj. Kiel citas el Talmudo la rolulo Itzhak Stern, "*kiu savas unu vivon, savas la tutan mondon*". Ankaŭ kiu murdas unu vivon, kaj same kiu prifilmas unu vivon, respektive murdas, prifilmas la tutan mondon per sia faro.

La filmon mem mi opinias nek majstra nek ronde perfekta, sed ja tre bona kaj nepre spektinda. Kutime ni scias la nomon (kaj konas la vivon) de la murdisto, de la ekzekutisto, sed malofte ni estas bone informitaj pri la dekoj, centoj, miloj, milionoj da viktimoj, kiuj vivis kaj mortis kvazaŭ en neniiga anonimeco, ĉar nur la grizajn kadavrojn kaj nombrojn ni vidas. Reĝisorate de Spielberg, grupo de bonegaj aktoroj vivigas antaŭ ni ne nur la fabrikestron (Liam Neeson), lian judan administranton Itzhak Stern (Ben Kingsley) aŭ la *ŝindler-judinon* Helen Hirsch (Embeth Davidtz) kune kun aro da judaj familioj, sed ankaŭ la krudan komandanton de

la koncentrejo, Amon Goeth (Ralph Fiennes). Kaj Spielberg prezentas ĉion ĉi en maniero sobra, sen troaĵoj aŭ ekscenoj. Al tio certe kontribuas la nigra-blankeco de la filmo, kiel en *La elefant-homo* aŭ *Eŭropo*, sed ne nur, nek ĉefe, tio. Ekzemple, tre interesas min en filmoj, kiel oni bildigas ies morton kaj, pli specife, ies mortigon (oni memoru la faman *La sep samurajoj*, de Akira Kurosawa, aŭ la ne malpli klasikan *Good Fellas*, de Martin Scorsese): ĉi-okaze la reĝisoro bildigas ĝin simple sed trafe, ŝajne senpasie. La stilo de Spielberg en *La listo de Schindler*, kvankam pli atentinda pro la tem-elekto ol pro kina artismo mem, signifas atingon de pinto, de neimitebla modelo en sia ĝenro, de defio, kiun ontaj reĝisoroj pri la sama temo devos lerte ĉirkaŭruzi.

Nur du mankojn mi trovis: unue, la lingva kohereco iom lamas, ĉar foje aŭdeblas la lingvo germana, foje la pola, foje la hebrea, kaj plej ofte la angla en la rolo de la germana aŭ la pola. Sed tio probable ĝenas nur esperantistojn... ĉefe se oni komparas kun la samjara kaj (ne nur) lingve katastrofa *Ĉielo kaj tero*, de Oliver Stone, aŭ kun la multaj aliaj detaloj skrupule priatentitaj de la ĉiam zorgema Spielberg. Due, por ne ripeti la eraron de Spike Lee en la fino de la interesege filmo *Malcolm X*, malmankas la lastaj koloraj minutoj, kiuj nenion aldonas al la impres-povo de la historio; anstataŭe preferindus epilogaj vortoj sur nigra fono aŭ similaĵo. En la citita artikolo Joan de Sagarra sin demandas, kial en tiuj minutoj grupo da judoj liberigitaj el koncentrejo kantas kanton pri Jerusalemo komponitan en 1967. Kaj por respondo li citas sindemandon de Elisabeth Schemla en *Nouvel Observateur*: "Ĉu tio volas diri, ke la ŝtato Israelo egalas elaĉeton el la holokaŭsto, kaj ke la morto de milionoj da judoj havis, kaj havas sencon?"

*La listo de Schindler* ne povus esti pli oportuna ol ĝuste nun, en 1994, cent jarojn post la pseŭdoproceso kontraŭ Alfred Dreyfus, kaj kiam en Francujo oni ekigis proceson kontraŭ la militkrimulo Paul Touvier, kunlaborinta kun la nazioj dum la Vichy-reĝimo kaj poste komplice protektita de la franca katolika eklezio dum jardekoj. Des pli oportuna kaj bonvena, kiam kelkaj provas ne nur mem forgesi, sed ankaŭ forgesi. Al tiuj, kaj al ĉiuj ceteraj, necesas daŭre rememorigi la okazintan.

Georgo Kamaĉo, Hispanujo

<sup>1</sup> geto: ghetto, getto

<sup>2</sup> holokaŭsto: ĉi-takste, universala mortigo de judoj, laste far nazioj.

## REZULTOJ

Jen la solvo de la krucvorto publikigita en *KONTAKTO* 137/138, 1993:5/6. Respondis homoj el Argentino, Danio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio (la plej bone reprezentita), Kostariko, Nederlando, Rusio kaj Svedio. Lotume gajnis Aleksandr Blinov el Rusio. Gratulon!

1	T	R	A	D	U	K	I		
2	E	R	A	E	G	K	A		
3	L	A	O	T	A	I	N		
4	E	G	E	R	I	R	K		
5	K	O	M	P	E	N	D	I	O
6	T	R	A	V	O	G	R		
7	R	O	H	E	J	I	A		
8	O	P	A	N	E	I	Ŭ		
9	S	A	L	O	N	O	J		



Ĉu plaĉis al vi la unua artikolo de tiu ĉi serio? Jen tuta aro da konsiloj por viaj rilatoj kun la "plej alta spirito de malbono", laŭ la difino de PIV.

# SATVNAJ<sup>2</sup>

proverboj

BERNARD GOLDEN, HUNGARIO

## Kiel rilati al la diablo per proverboj

En la pasinta numero de *KONTAKTO* (139, 1994:1) aperis artikolo pri traktanta esperantigitajn versiojn de proverboj, en kiuj rolas la diablo. Ili ilustras personajn trajtojn de tiu inferulo. Por la dua parto de ĉi tiu serio mi kolektis aron da saĝaj eldiroj, kiuj prezentas gvidliniojn por rilatoj inter homoj kaj la diablo. Oni povas informiĝi kiel eviti aŭ forpeli Luciferon, aŭ, se tio ne eblas, kiel konduki ĉe li por ne ricevi malbonan traktadon.

### 1. Evito de kontakto kun la diablo

Zamenhof emfazas en du proverboj, ke oni agas saĝe, se oni evitas mal-bonaĵojn:

- Pli facile estas eviti ol spiti. (Z 1983)
- Pli facile estas malbonon eviti, ol korekti. (Z 1984)

La sekvaj du proverboj esprimas la deziron, ke la diablo ne estu proksime:

- Dancu diabloj, sed ne en mia arbaro. (Z 279)
- Lasu la diablon amuziĝi, sed ne en mia ĝardeno. (Hungara)

Se la diablo jam prezentis sin, oni povas provi forpeli lin, jen per ekzorcado, kiu ne ĉiam sukcesas, jen per provo forteni lin, jen per dono de la unua bato.

- Li elpelas la diablon per Baal-Zebub. (Germana)
- Ameno diablon ne forpelas. (Z 70)
- Pli bone teni la diablon ekster la pordo, ol poste forpeli lin el la domo. (Angla)
- Pli bone mortigi la diablon, ol lasi vin esti mortigita de li. (Franca)

### 2. Incitado kontraŭ la diablo estas malkonsilinda

Se oni ne sukcesas eviti aŭ forpeli la diablon, oni almenaŭ agu saĝe por ne inciti lin aŭ mensogi al li.

- Estas pli facile kolerigi la diablon ol lin pacigi. (Angla)
- Ne provoku pli da diabloj, ol vi kapablas kvietigi. (Angla)
- Al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu. (Z 22)
- Al Dio servu, diablon rezervu. (Z 23)
- En infero loĝante, kun diabloj ne disputu. (Z 499)
- Pli bone estas flati la diablon, ol batali kontraŭ lin. (Angla)
- Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu. (Z 353)
- Estas peko mensogi eĉ kontraŭ la diablo. (Angla)
- Diru la veron kaj hontigu la diablon (Angla)
- Plenumi sian vorton, eĉ se ĝi estus donita al la satano. (Z-PIV)
- Ankaŭ la diablo ne mensogas pro propra honto. (Hungara)

### 3. Trompado kontraŭ la diablo estas vana

Oni ne provu superruzi la diablon. Tiu artikolo ĉiam kapablas elturniĝi por havigi al si avantaĝon.

- Kiu la diablon volas trompi, devas tre frue ellitiĝi. (Angla)
- Kiu verspermanĝas kun la diablo, havu longan kuleron. (Angla)
- Donu al la diablo fingron, li postulos la tutan manon.
- La diablo nek semas nek rikoltas, tamen li plu vivas. (Hungara)
- Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis. (Z 341)
- Dio ne ricevis, diablo forlevis. (Z 350)

La sekvaj proverboj esprimas kontraŭdiron:

- Kion Dio donos, la diablo ŝteli ne povos. (Angla)
- Dio sendas viandaĵojn kaj la diablo sendas kuiristojn. (Angla)

### 4. Diabla puno atendas mallaboremulojn

Se oni estas maldiligenta kaj ne emas labori, la diablo donos taskon; tamen, li ne okupiĝas pri tute sentaŭgaj homoj.

- La senokupa cerbo estas la laborejo de la diablo. (Angla)
- La diablo trovas malbonon por manoj, kiuj faras nenion. (Angla)
- Kiu estas okupata estas tentata de nur unu diablo; kiu nenio faras, de tuta legio. (Angla)
- La diablo tentas ĉiun homon, sed la neni faranto tentas la diablon. (Angla)
- Malbonulon diablo ne prenas. (Z 1428)
- Li estas tiel malbona, ke eĉ la diablo ne bezonas lin. (Hungara)


### 5. Malgraŭvola kunlaborado kun la diablo

Kelkfoje estas necese vole nevole agi favore al la diablo, kvankam li mal-multon meritas kaj ne estas amiko. La sinsekvoj de tiu konduto estas, ke oni troviĝas en diabla situacio.

- Donu al la diablo la proprajn de la diablo. (Angla)
- Kelkfoje estas necese bruligi kandelon ankaŭ por la diablo.
- Kiu prenas la diablon en sian boaton devas transporti lin trans la lagon. (Angla)
- Se vi glutis la diablon, vi rajtas glutiti liajn kornojn. (Angla)
- Ne estas mirinde, se diablidoj sekvas, kiam la diablo antaŭen-iras. (Angla)
- Kiu loĝas kun diablo devas fariĝi diablo. (Hungara)
- Ĉar la diablo loĝas en infero, li deziras havi aliajn tie en sufero. (Hungara)
- Kiam la diablo estas morta, neniam mankas al li ĉeffunebrulo. (Angla)

(Daŭrigota)

Proverboj estas grava ero de kiu ajn vivanta lingvo. Proverbaro Esperanta (Stafeto: La Laguna, Kanarioj, 1974, 168p.) de Zamenhof enhavas 2630 Esperantajn proverbojn. Enkonduko kaj postparolo de Gaston Waringhien. Prezo: 18 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.






# La angulo


de Ludmila kaj Petro

**se tra la mezo** de iu ajn kordo PQ de iu ajn cirklo ni gvidas du aliajn kordojn AB kaj CD (A kaj C kuŝu sur la unua arko PQ, kaj B, D – sur la alia), tiam S iĝas mezo inter punktoj T kaj U, en kiuj AD kaj BC tranĉas PQ.

Pro la bildo, kiu el tio rezultas, tiu ĉi fakto estas konata kiel *Teoremo de la papilio*.




**pluvo** ordinaro plirapidigas niajn paŝojn, male ni malsekiĝus tro! Preciza analizo pravigas tiun ĉi konduton. Ĉiuj scias, ke kiam ni celas atingi iun ŝirmejon, ju pli rapide ni moviĝas, des malpli ni malsekiĝas.



Sed tamen ni ne tro penu, ĉar kiam ni kuras po 10 metrojn sekunde ni estas nur 10% malpli sekaj ol je rapideco de 3 metroj sekunde.

malpli sekaj ol je rapideco de 3 metroj sekunde.


**la sunon**, pro la grandega kvanto da sunlumo, oni povas observadi nur uzante longfokusajn objektivojn, kiuj ebligas grandan skalon de la sunspekto.



Se vi iam fotis per aparatoj kun longfokusaj objektivoj vi certe scias, kiom rapide malgrandiĝas la t.n. objektiva brilo konforme al la kresko de la fokusa longeco. Sed ĉar tre longaj teleskopoj ne estas tre oportunaj por uzado, sunteleskopoj ordinaro ne estas

moveblaj kaj la sunlumo direktiĝas al ili tra sistemo de du plataj speguloj.

En tiuj teleskopoj ofte la rolo de la objektivo estas plenumata de tunelo enprofundiĝanta en la tero. La plej granda tia teleskopo troviĝas en la usona observatorio sur Kitt Peak, Arizono, kies objektivo longas je 90m.



sciujo

## Insektomanĝaj floroj

*Sciencfikciaj filmoj kelkfoje montras tiajn monstraĵojn kiel karnomanĝantaj plantoj, kiuj atakas homojn, aŭ submarajn florojn manĝantaj subakvistojn. Ĉu fantazio? Kompreneble jes.*

**E**kzistas sendube "submaraj floroj", kiuj manĝas malgrandajn fiŝojn. Ili ne estas plantoj sed polipoj de koraloj. Kaj ankaŭ estas vero, ke ekzistas plantoj, kiuj manĝas insektojn. Temas pri tre strangaj plantoj, kiuj vivas en diversaj lokoj de la mondo. Sed kial ili bezonas manĝi insektojn?

Ili bezonas manĝi etajn bestojn por sia metabolo. Tiuj plantoj, kiel ĉiuj verdaj plantoj, klopodas fotosintezon. Tio signifas, ke ili sintezas glukozon dank' al la suna energio, kiun oni povas ŝanĝi en kemian energion. Por konstrui aliajn bezonatajn komponaĵojn kiel aminoacidojn, sen kiuj ne eblas sintezi proteinojn, oni bezonas nitrogenon. Bedaŭrinde nitrogeno ne estas ĉie akirebla. Ĝenerale sur la grundo de marĉoj, kie kreskas la plejmulto de insektomanĝantaj plantoj, mankas nitrogenaj saloj.

Por akiri nitrogenon la planto malkomponas la insekton kaj prenas la nitrogenon de la insektaj aminoacidoj. Kompreneble, plantoj ne povas manĝi insektojn en la senco konata inter la bestoj; ili ne havas buŝon! Ili do estas devigataj malkomponi la insekton ekstere kaj poste absorbi la likvan produkton de la malkompono.

Por atingi la insektojn tiaj plantoj posedas diversajn kaptilojn. Ekzemple la malaja planto nepento posedas certajn foliojn transformitajn en kruĉeton kun kovrilo. La insekto falas en tiun ĉi kaptilon kaj... la ceteron faras la enzimoj. Alia planto, konata ankaŭ en Eŭropo kaj Nordameriko, drozero (aŭ sunroso), posedas specialajn florojn kun haroj finiĝantaj per glandoj. La insekto unue algluiĝas al la folio kaj poste dank' al la enzimoj en la glandoj estas "formanĝata". Ĉiuokaze, ekzistas limo por la grandeco de la insekto. La plantoj povas preni nur malgrandajn insektojn, kiel ekzemple etajn muŝojn.

La ekzisto de tiaj ĉi estaĵoj estas evolu-fenomeno, ĉe kiu eblas klare konstati grandan specialigon de la plantoj kaŭze de mediaj naturkondiĉoj. La insektomanĝaj plantoj estas unu plia miraklo de la naturo.

*Remigiusz Mielcarek, Kanado*





*Nepento, la malaja planto, kiu tute ne pentas formangi insektojn!*

speciale

## Ĉu vi jam pendigis Dimason?

La venontan fojon, ke vi ion perdos, provu pendigi Sanktan Dimason. Kio? Ne, ne temas pri malrespekto al sanktulo sed pri malnova kuba kutimo, kun (vere!) garantiita sukceso.


Sankta Dimaso estas la ŝtelisto, kiun oni krucumis apud Kristo, kaj kiu agnoskinte Lin, pentis kaj eniris en la Ĉielon. Nu, bone, sankta aŭ ne, kiam io malaperas oni nepre suspektas tiun, kiu famis pri nebrideblaj fingroj. Tial, kiam io malaperas hejme, estas kutimo kuba pendigi Dimason, ĝis li pentos kaj redonos la "ŝtelitan" objekton. Tiucele sufiĉas ŝnureto, kaj iu ajn pendigebla objekto (ekzemple, krajono), kiu rolos Dimason. Post iomete da tempo la petolema sanktulo pentas kaj redonas la perditan objekton.

Sed atentu! Oni devas klare sciigi al li la kialon de la puno. Ĉar li respondecas pri tiom da diablaĵoj, eble li aperigos ĉion, kion li dum jaroj ŝtelis, sed ne la deziratan objekton... Li ne famas pro bona memoro!

*Alberto García Fumero,  
Kubo*



## Jen la ĉefverko!



**Pli ol  
3200  
eroj sur  
160 paĝoj**

La katalogo estas sendita senpage al la regulaj klientoj de la Libroservo de UEA. Ĉiuj aliaj povas aĉeti ĝin por la prezo de 9 gld. Triona rabato ekde 3 ekz. Aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 5 gld.) kaj por la klientoj en la Eŭropa Unio 6% por imposto.



tre  
facila

ICĴO ĉiam estis la plej bona amiko de Petro. Tamen, kiam diversaj knab-grupoj formiĝis en la klaso, ili apartiĝis. Petro aliĝis al la Superuloj, ĉar ili kontentigis lian deziron rigardi la mondon de supre. Riĉjo akceptiĝis en la Belan Fiŝaron, grupon pli malgrandan, kun ĉefe eksterlandana membraro. Ilia urboparto estis tre diversa: manlaboristo proksimis al pur-manaj oficistoj, homoj riĉaj al senriĉaj, nacia loĝantaro al alilanda. La knab-grupoj organiziĝis laŭ\* tiu diverseco.

La Superuloj agis aĉe. Ili vortigis malamon al alilandaj laboristoj, kiam tiuj, surstrate, aperis solaj kaj ne speciale fortaj. Ili ĵetis ŝtonojn\* al la fenestroj de domoj, kie judoj\* loĝis. Unu-vorte, ili permesis al si ĉion, kio povas naski senton de superereco. Pri la malfeliĉeco, perdiĝo, senhelpeco, kiujn ili kaŭzis, ili ne zorgis pli ol pri malpura gazeto, kiun de-longe oni forĵetis.

Petro estis bonega sportulo, knabo kun multe pli granda forto ol ĝenerale troviĝas ĉe lernanto dekkvarjara. Post li la plej forta en la klaso estis Riĉjo. Tiu ne ŝatis la Superulojn. Ver-dire, ili neniam akceptus lin. Ili malamis la afrikanojn, kaj en Riĉjo estis io afrika, la haroj\*, ekzemple, kaj ankaŭ io en lia ĝenerala koloro, tute ne nord\*-eŭropeca. La aliĝpeton de Petro la Superuloj akceptis, sed ne tuj. Liaj haroj ne tute similis al tiuj de Riĉjo, tamen ili aperis iom trans-mar-ulaj. Kaj sentiĝis malcerteco en la grupo, kiam iu malkaŝis, ke la familia nomo de lia patrino estas Pinhas. Tiun nomon li, kiel ĉiuj aliaj, opiniis portugala, pro la *nh* en ĝi. Estis multaj portugaloj en la lernejo, kiel en la urba laboristaro, kaj kelkaj havis nomon kun *nh*. Por la Superuloj, portugaloj estis bestoj.

Malproksime de la urboparto, kie tiu knabgrupo loĝis kaj fordonis sin al siaj agaĉoj, kuŝis juda enterigejo. Foje, dum libertago, la grupo decidis iri tien por plezurigi sin per disrompo kaj larĝa-vorte skribaĉi sian malamon al la judoj. Petro kuniris.

Dum ili iradis tien kaj tien en la tombejo\*, la knaboj ne rigardis la surskribojn. Multaj ja estis en la hebrea\*. Sed foje, kiam Petro pretiĝis por skribi vortaĉojn sur belan ŝtonon nom-memor-igan pri mortulo, li vidis ion, kio tute forprenis de li la povon movi sin, kaj eĉ pensi. Verdire, la ekmiro estis tia, ke li preskaŭ falis. Dum longa minuto li staris tie, kiel senvivulo. Lin plenigis sentoj malklaraj, sed disrompaj. Sub hebrea surskribo ja legeblis nia-skribe la nomo de la mortulo: Emmanuel Pinhas.

Dum li tie staris, la grupo plu iris sian vojon en la tombejo kaj lasis lin malantaŭe. Li sentis, ke li ne povos tuj rekuniĝi kun ĝi. Li eliris, penseme. Sen scii ĝuste, kion li faras, kaj kial, li piedis direkte al la urbo, tra loko sendoma. Li perdiĝis en la pensoj kaj nenion rimarkis.

Kiam unua ŝtono alflugis kaj aŭdeble falis malantaŭ lin, li ekmiris. Sed kiam la dua frapis lian manon, venis tuj kompreno. Kaj li ekrapidegis for, dum la Superuloj malantaŭ li vortaĉis plejpleje klare sian opinion: "Judo! Malverulo! Kaŝema besto! Venu ĉiuj, ni mortigu la aĉan kaŝ-judon!" Ŝtonoj pli kaj pli multaj falis ĉirkaŭen, unu aŭ du eĉ sur lin, feliĉe ne sur gravan parton.

# LA SUPERULO

Claude Piron, Svislando

Dank' al tio, ke li estis la plej bona sportulo el la klaso, li sukcesis forrapidi. Se, antaŭe, la grupo atendus iom pli longe antaŭ ol sendi la unuan ĵetaĵon, kaj do estus pli proksima, li ricevus tiom da ŝtonoj, ke eble li jam estus morta. Sed ili tro frue, de tro malproksime komencis, kaj tiel informis lin pri sia malbon-cela veno. Li plene uzis sian nekomunan rapidecon por lasi ilin pli kaj pli fore. Post dek minutoj li eniris la malnovan parton de la urbo, kie la multaj mal-larĝaj stratetoj ebligis al li malaperi el ilia vidado. Kiam sur pli larĝa strato li renkontis aŭtobuson, li enrapidis en ĝin. Nun li estis certa, ke li alvenos hejmen antaŭ ol ili revidos lin.

Sed tuj post la enhejmiĝo, li bezonis kontentigi gravan scivolemon. Lia patrino laboris super vesto en la sidĉambro.

"Panjo\*, ĉu vi estas kristana?", li demandis eĉ antaŭ ol eksidi. Sed ŝin zorgigis io pli fakta:

"Kio okazis al vi? Rigardu vian manon..."

"Knaboj ĵetis ŝtonojn al mi! Ili diraĉis, ke mi estas judo."

Ŝi direktis al li miran rigardon, en kiu legiĝis ankaŭ timoplena malcerteco. Kaj zorgemo. Ŝi demandis:

"El kie ili prenis tiun ideon?"

Petro rakontis. Li sentis sin aĉe. Lia patrino sciis nenion pri la knabgrupoj kaj lia membreco en la Superuloj. Estis ege malfacile raporti pri iliaj faraĉoj en la juda tombejo. Sed li sentis bezonon pensi klare, kaj por tio necesis scii, kaj por scii, diri la veron. Kio okazis post lia longa senmova rigardego al la tomboŝtono, li ne sciis ĝuste, sed facile povis bildigi al si. Plej verŝajne knabo rimarkis, ke li forlasas la grupon, memoris, kie li antaŭe haltis kun ekmiro, reiris tien kaj komprenis pro la nomskribaĵo.

"Jes, mi estas kristano," ŝi fine respondis lian unuan demandon. "Sed mi naskiĝis juda. Mi kristaniĝis ne pro vera kredo, nur pro timo. En la tempo de Hitler, tiom da familianoj..." Tro fortaj

sentoj malhelpis ŝin paroli plu. Post minuto ŝi tamen rekomencis: "Vi scias, ĉu ne?, ke filo de juda patrino estas judo, laŭ la juda pensmaniero, kaj ankaŭ laŭ multaj jud-malamikoj. Vi do estas judo."

"Kial vi neniam diris al mi?"

"Mi esperis, ke nescio restigos vin ekster la aĉaĵoj, kiujn travivis nia popolo. Mi komprenas nun, ke ne eblis. Mi agis malĝuste..." Sekvis longa senvorta daŭro.

"Mi bezonas esti sola," Petro fine diris, kaj eliris el la domo.

Dum pli ol du horoj, li piediris sencele sur la stratoj, kaj provis klare pensi, sensukcese. Jam estis nokto, kiam li decidis viziti Riĉjon. Soleco ne estis facile portebla, sed reveni hejmen li ne povis tuj. Riĉjo akceptis lin plej amike. Tamen, la unua demando de Petro povis nur mirigi lin:

"De kie vi ricevis tiujn afrikecajn harojn?"

"Mian patrinon naskis virino, kiu... kiel diri?... tro amis virojn. Kiam ŝi loĝis en Antverpeno, ŝi iris kun ĉiaj, maristoj ĝenerale. Mia patrino neniam sciis, kiu estas ŝia patro; plej verŝajne afrika maristo. Sed kial vi demandas? Kial vi venis al mi?"

"Mi bezonas paroli, kaj al nenies vera amikeco mi povas kredi, krom al la via. Rigardu mian manon. Tion faris ŝtono. La Superuloj elĵetis min el la



Marlin Burkert



# anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

**Aĝo ne estas baro:** leteru al mi! Universitata studento, Francis M. Onyeneke atendas vian respondon ĉe P.O. Box 216, Bauchi, Bauchi State, Niĝerio

**Nova adreso en Stockholm:** Esperanto-Centro en Stockholm translokiĝis al Vikingagatan 24 SE-11342 Stockholm, Svedio. ☎ +46-8-340800 (apud subtera stacio St. Eriksgatan)

**31-jara komercantino** volas korespondi kun homoj super 18. Kerry K. Collins, 2530 South Main St. # 28, Rockford IL 61102, Usono

**17-jara studento** deziras korespondi kaj interŝanĝi. Bahram Karimzadeh, No. 52, Golestan Lane, Ayatullah Kashani Ave., IR-69166 Borujerd, Irano

**Se vi ankoraŭ ne forgesis kiel fari rideton,** sendu ĝin al nia internacia ekspozicio *La mondo ridetas*. Eblas aldoni rideton de amikoj, najbaroj, eĉ hejmbestoj, rakonti pri vi mem kaj mesaĝi al la vizitontoj. Sendu vian fotan, desegnitajn, printitan rideton ĝis la fino de 1994 al Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pk. 76, UZ-703000 Samarkando, Uzbekio

**Tri hispanaj komercantoj** (25/35-jaraj) deziras korespondi. Adreso: Rodríguez San Pedro 13 3er. 7, ES-28015 Madrid, Hispanio

grupo, per ŝtonoj kaj vortaĉoj. Ĉar mi estas judo.”

“Judo, ĉu vere? Kaj tamen membro de la Superuloj!”

“Mi ne sciis. Pri mia judeco mi eksciis nur hodiaŭ. Kredu min, mia tuta mondo disrompiĝis, kiam tiu novaĵo falis sur min...”

Li klarigis la aferon. “Kion mi faru nun? Ili kredas, ke mi vole kaŝis mian judecon, ke mi estas aĉulo, iu nenivalora, kiu same aĉe agas rilate al ili, kiel al la judfratoj. Mi ja partoprenis en la malpurigo de la juda tombejo, kiel mi antaŭe ŝtonrompis kun ili judajn fenestrojn. Kiel mi povis? Diru al mi, Riĉjo. Kiel mi povis agi tiel sensente, tiel neheme?”

“Pri tio pripensu mem. Ne mi povus respondi. Se vi sciis, kiom mi malfeliĉis, kiam vi aliĝis al via fia grupo! Mi kontentas pri tio, kio okazis. Vi nun certe forlasos la idearon de la Superuloj, komencos kompreni, ke superi ne estas io necese bona, kaj ke malsuperuloj indas je homa rigardo. Tiel mi pli ŝatos amiki al vi. Pri la Superuloj, kion mi povus diri? Mi ne scias. Eble ili faros nenion. Vi ja estas la plej forta el la klaso!”

“Sed kontraŭ ok knaboj kun la decido malbonfari, kion eĉ fortulo povas?” Senvorteco plenigis la ĉambron, tiel riĉa je pensado, ke ĝi ŝajnis aĝo preskaŭ man-sentebla.

Riĉjo estis la unua, kiu reparolis:



“En la Bela Fiŝaro ni estas nur kvin, sed kun vi ni estos ses, kaj mi estas preskaŭ same forta kaj rapida kiel vi. Nia grupo enhavas nur sen-timulojn, male al la Superuloj, kiuj bezonas kredigi sin superaj nur, ĉar ili konas sin timemaj, povaj nur grupe superi. Ili

frapas nur solulojn, kaj se eble pli etajn. Estas pli facile ŝtonrompi fenestrojn aŭ sur domo larĝa-vorte skribaĉi ol akcepti militrenkontiĝon kun sen-tima seso. Kiam ili sciis, ke nia grupo staras kun vi, ili perdis ĉian deziron fari al vi malbonon. Tamen, zorgu neniam esti sola ĉe pluraj el ili.”

Liaj paroloj montriĝis ĝustaj. La Superuloj nenion faris al Petro, aŭ pli ĝuste nur laŭ timula maniero, ekzemple per leteraĉoj. “Sed,” la knabo diris, raporte al mi pri tiuj travivaĵoj, “tio ne helpis min eliĝi el mia problemo, la problemo pri mi mem, pri mia esto. Je la aĝo de dekkvar jaroj mi senvole judiĝis, kaj el tiu ŝanĝo de esto mi ĝis nun ne trovis, kion fari. Ĉu vi povos helpi min?”

- haro:** maldikega longa elkreskaĵo, kiu kovras ĉefe la supron de nia kapo je milionoj
- hebrea:** lingvo de Israelo, de la Biblio
- judo:** membro de la popolo de Abrahamo; Izrael-ido
- kristano:** kredanto je Jesuo Kristo
- laŭ:** je
- nordo:** loko, kiu estas supre; “Eŭropo kuŝas je la nordo de Afriko.”
- panjo:** pli bela, varma vorto por *patrino*
- ŝtono:** nerompebla aŭ malfacile rompebla naturo
- tombo:** truo en la tero por morta korpo

## elĉerpiĝis...



... nia stoko de **KONTAKTO 127** (1992:1) kaj daŭre venas mendoj por tiu jarkolekto. Cu vi pretas afable redonaci al la Centra Oficejo vian ekzempleron de tiu numero? Koran antaŭdankon!



## Resumo de la antaŭa ĉapitro

*Alice gvidas la gefratojn al floro, kie estas la libro de la stranga virino. Tie, sur muro, Xie vidas bildojn de la kvar sanktaj bestoj, ankaŭ la Drako! Kaj montriĝas ke la libro, treege malnova, estas el la dudeka jarcento.*

Xie Kitchin sidiĝis surplanke kaj komencis legi la libron.

– Sed ĝi estas tro komplika, Alice. Mi komprenas nenion.

Ŝi nenion komprenis, sed tamen ŝi ne povis ĉesi legi.

Foje ŝi saltis parton, foje ŝi returnis paĝon, daŭre atenta por kapti la aperon de la vorto Lalande.

Plurajn horojn ŝi sidis tie, serĉante.

Intertempe, Alice montris la ceteron de la hejmo al Johano.

– Ĉu vi vidas tiun pordon? Trans ĝi troviĝas la maro.

– La maro?

– Jes, la maro antaŭmatene. Ĉu vi ŝatus vidi?

– Volonte.

Alice malfermis la pordon, kaj ili vidis la maron. Sentebliis sala brizo, estis plaĉe malvarmete. Ili komencis promeni sur la sablo, malrapide, interŝanĝante vortojn en silento.

La ĉielo plenplenis je steloj. De tempo al tempo, stelo plonĝis kaj poste reiris al la ĉielo briligante salajn gutetojn.

Johano subite pensis pri sia fratino, pri kiam ŝi havis danĝeran deziron.

– Alice, ĉu vi jam vidis sirenon? Ĉu vi jam aŭdis ŝin kanti?

– Jes, jam.

– Kaj do? Ĉu estas bele?

– La sireno, kiun mi konis, kantis kaj rakontis.

– Kion ŝi rakontis?

– Rakontojn. Ili ŝategas rakonti, sed tion malmultaj homoj scias. Mi ĵus diris al vi sekreton.

Li volis fari alian demandon, kiu tamen embarasis lin.

Malgraŭ tio, li fine demandis.

– Ĉu ankaŭ vi scipovas inventi rakontojn?

– Jes.


– Do... eble vi povus inventi iun kie mi kaj vi... tio estas, la du el ni...

– La du el ni... kune... en plaĝo, antaŭmatene...

– Jes! Kaj tiam, unu apud la alia...

– Unu apud la alia... kaj kiso.

Ili kisis. Johano ne sciis ke ilia rakonto estas inventata de kiam ili renkontiĝis ĉe la vilaĝo, sub la arbo, kie li restis aŭskultante foran kanton.



# Lalande

Flávio Martins Carneiro, trad. Izabel Santiago

7. lasta

Des malpli li sciis ke tiu, kiu kantis, inventas la tutan rakonton.

– Ĉu la suno neniam leviĝas? Ĉu estas ĉiam antaŭmatene?

– Venu kun mi.

Ili iris de tie, kaj Alice montris al li fermitan fenestron:

– Trans tiu fenestro estas la maro vesperiĝe, sunsubire.

Kaj se vi eniros la unuan tirkeston de la skribotablo, vi vidos la maron frumatene. En la dua tirkesto troviĝas la maro posttagmeze. Estas maroj por ĉies gusto.

Ili saltis trans la fenestron kaj eniris la tirkestojn. Ili vidis multajn aliajn marojn en la marmora ŝranko.

Ili vidis tiom da aferoj, ke oni nur povas imagi. Estis tamen kiam ili penetris en la bretaron, ke la knabo vere raviĝis:

– Sed... sed kio estas tio?

Tio estis spegulo.

– Ĉu vi vidas kiel bela vi estas?

– Nekredeble. Kiel tio funkcias?

– Funkciante.

Johano ŝanceliĝis ĉu ekridi, plori, forkuri de tie aŭ resti kvieta. Kaj jen li faris nenion el tiuj, sed ĉirkaŭbrakis la knabinon.

– Bela estas vi. Vi similas al la maro.

– Kiu el ili?

– La unua, la antaŭmatena.

Alice sentis ekstremon aŭ ion tian. Ŝi estis preta diri ion, kion ŝi prisilentis de kiam ili trapasis la unuan pordon.

Kiam ŝi malfermis la lipojn por paroli, ili aŭdis krion:

– Mi trovis, mi trovis!

Kriis Xie Kitchin. Alice ankoraŭ havis tempon demandi al Johano:

– Kion vi sentis dum ni promenis sur la sablo de la unua plaĝo?

– Mi ne scias... mi sentis ion strangan, eskvizitan.

– Tiu io eskvizita estis Lalande.





– Io okazas ĉe mi.

➤ Alice kaj Johano vidis ŝin kaj silentis. Mi kredas ke neniu devis ion diri, krom Xie Kitchin mem.

– Nun ke mi trovis la signifon de la vorto Lalande, mi ne plu volas reiri al la urbo.

– Kial? – demandis Johano.

Xie ne respondis, nek atentis. Ŝajnis ke ŝi parolas al si mem.

– Tiel malsamaj... se mi povus enloĝi la vorton anstataŭ la urbon...

La paro mutis, eble komprenante.

– Ĉu ankaŭ la urbo Brilumo tute ne rilatas al la vorto? Kaj ĉu mia amiko ankoraŭ loĝas tie?

Tra la fenestro de la floro Xie vidis la arbaron eksteran. Malfruiĝis.

– Nu, sufiĉas. Adiaŭ, Lalande, adiaŭ, Brilumo, adiaŭ, floro.

Dum Xie Kitchin estis eliranta, Alice provis demandi:

– Ĉu vi ne volas eĉ malkovri kion signifas Brilumo?

– Ne. Fakte, mi jam scias. Ĝi signifas...

Tiam ŝi inventis signifon por la vorto, sed bedaŭrinde neniu scias kiun.

Iam iu proponis ke Brilumo signifas la brilon de la lumo je la kvara horo posttagmeza, kiam okazis la sceno kiun mi ĵus rakontis. Tio tamen estas nur supozo, neniel pruvita.

Kion mi povas aserti estas ke Xie Kitchin, rigardante la arbaron tra la flor-fenestro, vidis fone, fore, post kelkaj torditaj arboj, peceton da maro.

– Jen, mi iras serĉi la sirenon.

Kaj ŝi iris.

Ĉu ŝi trovis?

Ankoraŭ ne, preskaŭ. Mi diras tion ĉar mi jam povas vidi ŝin de ĉi tie, de mia hejma roko, kien foje pli forta ondo frapas. Ordinare ne estas tiel, sed hodiaŭ la maro estas iom aŭdaca.

Mi ne certas, ĉu ŝi je tiu distanco jam povas aŭdi mian muzikon. Ŝajne jes, ĉar ŝiaj okuloj briligas steletojn.

Ĉu mi konfesu ion? Estas sekreto de neniu konata kaj mi rivelos nun: sirena vivo estas iom soleca.

Nu, dum Xie Kitchin alproksimiĝas pli kaj pli – mi devas hasti – mi elpensas finaĵon por ĉi tiu rakonto, kiun mi inventis nur por rakonti al vi. Eble vi ŝatas ĝin kaj venos viziti min...

Ho, mi distriĝis kaj ne vidis ŝin alveni! Jen ŝi, ĝuste tie, ĉe la akvo, rigardanta al mi. Kaj nun? □

\* Oni diras ke tiu citaĵo venas el la libro *Perto do Coração Selvagem* (Apud la Sovaĝa Koro) de Clarice Lispector, brazila verkisto veninta el vulkana insulo.

Ŝi iam rakontis al li ke, infanaĝe, ŝi povis ludi tutan posttagmezon per unu vorto. Li do petadis ŝin inventi novajn. Neniam ŝi amis lin tiel intense kiel en tiuj momentoj.

– Bonvolu diri denove kio estas Lalande – li petegis al Johanino.

– Estas kiel anĝellarmoj. Ĉu vi scias kio estas anĝellarmoj? Speco de narciseto, kiun ajna brizo klinas tien kaj reen. Lalande ankaŭ estas antaŭmatena maro, kiam ankoraŭ neniu rigardo vidis la plaĝon, kiam la suno ankoraŭ ne leviĝis. Ĉiufoje kiam mi diras Lalande, vi devas senti la mildan, salan brizon de la maro, irante laŭ la plaĝo ankoraŭ malluma, malrapide, nude. Kaj baldaŭ vi sentos Lalande... Vi povas kredi min; mi estas unu el la homoj kiuj plej bone konas la maron.

(el la libro de la stranga virino)\*

## Malantaŭ la kulisoj

*Dekomence la legantoj scivolemis pli pri Lalande. KONTAKTO babilis kun la tradukinto, Izabel Santiago, por malkovri kuriozajn detalojn.*

### *Kiel vi konatiĝis kun Lalande?*

Kun Flávio mi konatiĝis kiam ambaŭ ni lernis Esperanton. Dum jaroj ni tute ne kontaktis unu la alian, sed iam ni hazarde revidiĝis kaj reamiĝis. Baldaŭ poste li ekverkis *Lalande*, kaj mi bonŝancis povi sekvi la verkadon de proksime.

### *Ĉu Flávio plu verkas?*

Jes ja. Nuntempe li multe okupiĝas ankaŭ pri instruado, sed ĉiam verkante. Veraj sirenoj apenaŭ povas ĉesi rakonti...

### *Ĉu Esperanto iel rolas en la rakonto?*

Miavide jes, kaj mi povus diri tri-paĝan libron pri tio. Flávio tamen ne emas legi siajn aludojn simile kiel mi. Ni estis tre mirigitaj pri kiel malsame ni komprenas la finan decidon de Xie. Eble nur mi legis kion mi legis, ĉu ne? Do ankaŭ pri tiuj aludoj. Plej gravas la opinio de ĉiu leganto, kaj mi certas ke Flávio konsentas pri tio.

### *Ĉu estis malfacilaĵoj en la tradukado?*

Pluraj. La plej instiga estis la inventita vorto *imagirassol*. Feliĉe, Flávio relernis iom da E-o kaj povis mem elekti inter kelkaj ebloj. Li preferis la solvon kreitan de Alan Romero: *sunreviĝo*. Alia problemeto rezultis je "marmora ŝranko", kiun mi devis skulpti. Kaj estis unu alispeca malfacilaĵo. En la unua originalo estis paradoksa detalo, kiun Flávio ne-vole kreis kaj kiun mi amis.



13

Vidante ĝin kiel eraron, li insistis ke mi sekvu korektitan version. Mi eĉ verŝis unu larmon kiam mi finfine obeis lin.


***Krom traduki vi kompostis, enpaĝigis kaj ilustris. Kial nenie videblas la roluloj?***

Ĉar ni interkonsentis ne limigi la imagon de la legantoj per la bildoj. Bildigi la placon, la vilaĝon aŭ rolulojn estus kiel enkadrigi *Lalande* en ian kulturon, en mondoparton. Mi celis lasi la aferon kiel eble plej liberimaga, kvankam la fonto de kelkaj bildoj ja sufloras ion. Dum la verkado Flávio tre zorgis enplekti aludojn kaj subtilajn spurojn de siaj inspiroj, ofte vortlude. Kaj mi provis imiti lin. Nun tamen jen malkaŝo: mi donas al vi bildon de la originala Xie Kitchin, fotita de Lewis Carroll. □

n-ro 140 (1994:2)

KONTAKTO





Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso.  
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

## Sankcioj

Per *Sankcioj* [vd. *KONTAKTO* 135 1993:3] mi celis nur montri, kion gejunuloj pensas pri la blokado. Ĉar verŝajne tio, kion oni ege malofte legas en "demokratiaj" ĵurnaloj multe pli interesas la *KONTAKTO*-legantojn. Nu, min vere surprizis, ke eĉ tia, sufiĉe neŭtrala temo por eks-jugoslavianoj, povas ĝeni.

Se de mi dependus la okazaĵoj en eks-Jugoslavio, mi delonge estus levinta la voĉon kontraŭ multaj aferoj! Eble plej unue kontraŭ la disfalo de eks-Jugoslavio! Antaŭ tri jaroj mi estis jugoslavo, do vi, t.e. tiuj, kiuj disrompis eks-Jugoslavian kulpas, ke mi nun estas serbo!

Al mi plaĉis la ideo pri jugoslavismo; mi kredis, ke tio estas la bazo por la fina komuna eŭropa lando. La sudaj slavoĵ antaŭ 75 jaroj faris tion, kion nun provadas Eŭropo! Sed ĉu eŭropaj politikistoj vere kredas, ke estas pli bone unue detruiri ĉion kaj nur tiam ekfari iun novan, pli bonan "konstruaĵon"?

La teritorio de eksa Jugoslavio (i.a.) estas nur ŝaktabulo, kie la mondaj potencoj ludas por siaj propraj interesoj. Bedaŭrinde ĝis nun Usono havis pli bonan pozicion ol Eŭropo...

Ĉu jam ne estas eksmoda la "vero", ke serboj estas agresuloj? Jen la plej bona senkulpiĝo por muzulmanoj! Ĉu iu povus ekpensi, ke ĝuste la muzulmana registaro kulpas pro la nunaj okazaĵoj en Bosnio?! Jen la serba **vero**, kiu ĝenas multajn. Ĉu iu scias, ke Alija Izetbegović mem en 1992 evitis subskribi la

proponitan planon de Eŭropa Unio por dividi Bosnion en tri partojn?! Islamo daŭre deziregas ekhavi islaman ŝtaton en Eŭropo! La plej granda "kulpo" de serboj tamen estas, ke ili tuj decide respondis, ke ili ne akceptas vivi en iu ajn islama ŝtato, nek iu ajn religie aŭ nacie deviga ŝtato. Eblas nur komuna ŝtato kun tute samaj rajtoj por ĉiuj! Bedaŭrinde por multaj, serboj estas la plej potenca popolo en Bosnio. Do, laŭ demokratia regulo, ke la decido de la plimulto validas por ĉiuj, serboj eĉ havis demokratian rajton por igi el la tuta Bosnio serban ŝtaton (!), kion ili tamen ne deziris fari. Ili sola deziro estas havi samajn rajtojn kiel la aliaj! Unu el tiuj rajtoj estas povi decidi, en kiu ŝtato ili vivas. Je la eksplodo de la jugoslavia krizo nur serboj deziris resti en Jugoslavio: ili ja delonge perdis la senton de sia nacieco kaj ŝtataneco.

Havinte sian propran ŝtaton dum mezepoko kaj antaŭ la unua mondmilito, serboj vere ekkredis je la komuna sudslava ŝtato. Sed subite ĉio detruigis... ĉiuj ekdeziris sian propran ŝtaton. Do, bone, bonvolu.

En Slovenio ne estis granda krizo ĉar tie ne ekzistis serbaj teritorioj. La milito tie estis nur spektaklo por ke la registaro povu pli facile "liberiĝi" de Jugoslavio. La jugoslavia armeo tute ne estis agresulo, ĉar ĝi laŭleĝe kaj laŭkonstitucie troviĝis en Slovenio ekde ties eniro en la komunan jugoslavian ŝtaton, jam en 1918! Ĉu jam tiam slovenoj ne deziris vivi en

Jugoslavio? Se ne, kial ili akceptis tion? Se la jugoslavia armeo estis agresiva armeo, ankaŭ slovenoj tiuokaze estis agresuloj, ĉar slovenaj junuloj militservadis en la jugoslavia armeo! Se eks-Jugoslavio vere estus serba ŝtato, kion oni ankaŭ ofte diris, mi dubas, ke ĉio ĉi okazus! Jen kiel Norda Irlando plu estas parto de Britio.

La serba registaro tamen fine akceptis la disfalon de Jugoslavio. La konstitucio antaŭvidis la eventualan ekdeziron, ke iuj respublikoj estigu proprajn ŝtatojn. Sed ankaŭ estis antaŭvidita la leĝa proceduro por tio. Per "milito" oni provis eviti plenumi leĝajn kondiĉojn! Ĉu tio estas demokratia? Ĉu la serba registaro estas nedemokratia, komunisma ktp. nur ĉar ĝi deziris, ke oni agadu laŭ leĝoj?!

Kun Kroatio okazis same, nur ke tie en du-tri regionoj vivas serboj, kiuj tute ne deziris eliri el eks-Jugoslavio! Jen la vera kulpo de serboj. Tiuj serboj eble eĉ akceptus vivi en memstara Kroatio sed nur sub kelkaj kondiĉoj. Unu el ili devus esti leĝa garantio pri samrajteco kun kroatoj mem. Sed restas freŝaj rememoroj pri la lasta kroata (faŝisma) sendependa ŝtato. Kaj la nova kroata registaro faris nun kelkajn aferojn tute same, kiel en tiu eksa kroata ŝtato! Do vi devas povi kompreni la timon pri la vivo se tiaj aferoj denove okazus! Nun la situacio ĝenerale estas trankvila. Se la politikistoj vere kaj honeste deziras solvi la problemon, tio estas ebla!

Bosnio. Eĉ ege multe pli komplika afero! Jen kelkaj faktoj: Slavoj venis sur la teritoriojn de la nuna eksa Jugoslavio kaj Balkano je la 5-a kaj 6-a (laŭ la okcidenta, neslava historio) jarcentoj. Ĉi tie ili akceptis kristanisman, kiu dividiĝis en du branĉojn: katolikajn sud-slavojn (kroatoj) kaj ortodoksajn sud-slavojn (serboj). La konfliktoj inter tiuj du "religioj" estis dorsobatoj por la sud-slavoĵ. Je la 15-a jarcento en Bosnion venis turkoj. Ili venigis islaman, la trian religion! Ĉar ankaŭ tio estas "vera kaj plej bona religio", ankaŭ ili tuj komencis varbadi la lokajn popolojn. La afero estis ege simpla: kiu akceptis islaman restis viva, kiu ne (negrave ĉu katolika aŭ ortodoksa) estis mortigita! Multaj veraj kristanoj pereis tiutempe. Turkoj restis en

Bosnio ĝis preskaŭ la 19-a jarcento. Tiuj, kiuj deziris travivi la turkan regadon kaj konservi siajn posedaĵojn akceptante islaman por sia religio estas la nunaj bosniaj muzulmanoj! Slavoĵ, ankaŭ kroatoĵ kaj serboĵ!

Se la serboj vivantaj en Bosnio estas agresuloj, same estas kaj muzulmanoj kaj kroatoĵ... Bedaŭrinde la muzulmana bosnia registaro ne ŝatus ricevi nur parton de eksa Bosnio! Se serboj estus dezirintaj "Grandan Serbion" ili estus povintaj ĝin ricevi tuj post la unua mondmilito, kiam ili militis kune kun la "demokratiaj" fortoj. Tiam Eŭropo mem proponadis tion al la serba registaro. Sed bonanimaj (ne "ĉielaj") serboj deziris helpi al la "fratoĵ", sudaj slavoĵ, kiuj restus en tiamaj Italio kaj Aŭstrio. (Multajn, ĉefe politikajn problemojn poste serboj havis pro tio; ankaŭ nun Vieno subtenas kontraŭ-serban flankon.) Nun videblas, kiom oni perdis pro tia "helpema" decido. La ĉefega kaŭzo por la bataloj en Bosnio estas nur ricevado (okupado) de pli da bosnia teritorio ol ili devus ricevi laŭ la plej unua "pacdivida" kontrakto. Tiu kontrakto estis rifuzita (fare de Alija Izetbegović, kiu daŭre ne estas kontenta pri la teritorioĵ, kiujn li nun posedas!) kaj la milito komenciĝis. La rakontoĵ pri interreligia kaj inter-nacia konfliktoj kaj malamo estas nur ŝirmilo por la politikistoj, kiuj eluzis tiujn diferencojn por dividi kaj tiel pli facile superregi! Ja tio estas politiko. Por atingi la celon oni malmulte konsideras la rimedojn: fine de la dua mondmilito oni ĵetis du atombombojn sur tute ne militajn celojn!

Mi ne respondos rekte al aliaj mencioj de la reago. Nek ĝia aŭtoro nek mi kulpas pri la okazaĵoj kaj estas senbezzone diskuti pri tio. Mi mem neniam estis kaj neniam estos naciisto (sed nur patrioto; ĉu eŭropa, jugoslavia, serbia – depende de la situacio). Karaktero estas la nura afero, laŭ kiu mi dividas la homojn: bonaj aŭ malbonaj. Nacieco, religio kaj aliaj ecoĵ, aparte tiuj, kiujn oni tute ne povas elekti aŭ ŝanĝi, tute ne gravas por mi...

Ĉion ĉi mi skribis kiel eks-jugoslavo, bedaŭrinde. Ankoraŭ mi al kutimiĝas esti nur serbo...  
Saluton al ĉiuj.

Zoran Ĉiriĉ, Serbio

Jaán Ojalo:

## esperantaj sinonimoj



La plej kompleta de sia speco; bazita sur Plena Ilustrita Vortaro. La unua parto donas sinonimojn por ĉ. 2000 vortoj. La dua parto estas indekso, kiu ebligas trovi sinonimojn por 5500 vortoj. Tre utila por pliriĉigi la vortotrezoron kaj freŝigi la stilon.

Dua korektita eldono, 1993. 96p. Prezo: 15 guldenoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



# Mi sonĝas pri paco

facila

**Mi** denove sonĝis\*.

Blanka kolombo\* flugas super Gospić. Mi vidas eksvingon\* de laflugiloj. Malrapide ĝi malaperas malantaŭ la preĝeja turo\*. Sur la stratoj amaso da infanoj en blankaj vestaĵoj. Mi aŭdas feliĉajn voĉojn. Kaj daŭre mi sonĝas, ke mi dum la sunleviĝo promenas tra la urbo. Mi esperas, ke tiu vojo gvidas al la paco. Nur la venteto en la arboj mal-laŭte\* paroletas, kaj de la alta Velebit subiras nokta vojaĝanto jam en la plena brilo radiante ombrojn\*. Malrapide proksimiĝas la nokto.

Sed mi ne ekdormas. Mi restas nedormema kaj certa, ke venis la paco, ke ĉio estos kiel antaŭe. Sed ne estas. Nenio ŝanĝiĝis. Ruinoj\* restas la samaj, detruitaj\* domoj, lernejoj, vojoj, ĉio... Kaj tiu detruado kaj mortigado ne ĉesas.

Jam kelkajn jarojn en mia patrolando estas milito, sed multaj infanoj sonĝas pri paco. Multaj homoj atendas

blankan kolombon. Sed ĝi ne venas, ĝi estas ĉiam pli kaj pli malproksime de ni. Ŝajnas, ke ĝi timas nin; Ŝajnas, ke ĝi forlasadas nin. Multaj homoj en tiu ĉi milito malaperis, multaj perdis sian blankan kolombon, sed malgraŭ tio la milito plu trapasas limojn, ĝi marŝas al la mondo. Ĉiu tago portas novajn viktimojn\*, novajn detruojn. Ŝajnas, ke la milito sekvas nin, persekutas\* nin, forsendas nin al la morto.

Ĉu tio estas nia morgaŭo? Ĉu tio estas nia estonteco? Ĉu de nia feliĉa infanaĝo restis nur malplena sonĝo pri la pli bona morgaŭo?

Nada Ŝimić, Kroatio

**detruoj:** malkonstrui

**kolombo:** blanka birdo de la paco

**laŭte:** sono forta, aŭdebla de malproksime

**ombro:** mallumo, kiu povas moviĝi

**persekuti:** kur-sekvi por kapti aŭ malamike trakti

**ruinoj:** restaĵoj de malkonstruo

**sonĝi:** vidi bildojn dum la dormado

**svingo:** rapide kaj ripete moveti ion en aero tien kaj reen

**turo:** tre alta kaj maldika konstruaĵo

**viktimo:** persono

suferanta aŭ mortinta

pro iu ago aŭ

okazaĵo

## Katalunio en PS

Pace, plenspekte kaj amike volas mi trankviliĝi la "urĝan bezonon enmiksiĝi en la debaton" de Per A. Fritzon [KONTAKTO 137/138, 1993:5/4].

Malŝatas li disigojn, ŝovinistojn, etmensajn naciistojn, kaj "kapricajn decidojn". Ankaŭ mi. Sed plie, mi malŝatas kaj timas miskomprenigojn. Ĉar mi malŝatas ŝtatlimojn kaj tial, ankaŭ la perŝtatliman disigon de irlandanoj, eŭskoj, katalunoj, hungaroj, laponoj, kaj ekster-eŭrope same, de kurdoj, araboj, majaoj ktp.

Esperanto estas interkultura, do internacia (ne *purpragmatisma* interŝtata) lingvo. Purpragmatisme bonvolu uzi la anglan kaj eble tiel, pragmatisma plimulto baldaŭ finvenkus. Tamen, indas kompreni, ke interkulturan komunikilon uzas socioj, kaj tiuj socioj malsimilas pro lingvaj, geografiaj aŭ tradiciaj kialoj (foje interne de la ŝtatlimoj, kiujn UN pragmatisme, sed ne eterne, agnoskas). Malnepre racias, kvankam aplikeblas, enkatenigo de

unuopaj kulturoj per iu altnivela kunveno internacia. Plie, IL-on ne naskis UN. Kaj nia komuna lingvo devus eniri ĉiujn kulturojn pere de ties propraj lingvoj (ne ĉiam ŝtataj). Do eble, tiel pli agas (kaj plibone) kebekianoj, tibetanoj, eĉ eskimoj!

Esperanto ne estas laŭ mi nur pragmatisma ilo, sed ankaŭ defendilo de kulturoj, kaj oni ne defendas kulturon dirante, ke temas pri iu glora, historia, riĉa, sed *regiona* kulturo, ĉar ĉiu lando estas regiona kaj ankaŭ ĉiu kulturo (escepte de la Esperanta). Multfoje kulturo enhavas regionaron, do ne indas ĝian tuton nomi per "regiono". Cetere, ĉiu regiono el la planedo rajtas montri kaj ĝui propran kulturon aŭ kultur-er-ojn, dum neniu ŝtato rajtas kaŝi kaj fine malaperigi lingvojn pro pragmatismo.

La agnosko de KEJ antaŭ ses jaroj tute ne estis kiel *ŝtata* asocio, sed landa. La statutoj kaj de TEJO kaj de UEA ebligas plurajn landajn sekciojn en sama regno, do estis saĝa decido ĉar krome, la radiko land- nek jure

nek lingve neprigas ŝtatecon. Ĉu ne oftas legi diversloke "Anglio" aŭ "Skotlando" anstataŭ "Britio"? Ĉu ne estas grava E-asocio la flandra, do, ne belga? Oni ne devigas nin uzi kiel sinonimojn la vortojn "nacio", "lando" kaj "ŝtato", kvankam ĉi-jarcente tre oftis tia mi(k)s-uzo. Nura lingva problemo estus distingo de federaciaj ŝtatoj (jen usonaj, jen meksikaj, jen brazilaj, ktp), kaj fakte estas ŝtatoj sed ne "nacioj" unuiĝintaj al la UN. Tre ambiguas, aliflanke, memstareco de la "nacioj" en la plej grava tutmonda asocio, ĉar ekzistas vetoa rajto por la plej povaj. Ĉu kompareblas en UN memstareco de, ekzemple, Luksemburgio, Niĝerio kaj Usono? Ĉu tiu sistemo kopiindas por la Esperanta tutmonda junularo? Tute ne, kredas mi.

Amiko Per, trankviliĝu, en Singapuro aĉetebblas mapoj de niaj *eŭropaj regionoj*; kvankam aliflanke, ĝia ŝtata registaro ne volis helpi antaŭ kelkaj jaroj la Uneskan agadon; kaj se singapura esperantisto volas

viziti amikon en Barcelono, tre eble la barcelonano jam sin prezentis al li kiel katalunon, do, nuntempe, ĝenerale, hispan-ŝtatanon, sed ne nepre hispanan gantiganon. Ni ne iru tiom malproksimen por serĉi senkulpigon por erara kaj ŝanĝebla sistemo. Ne-eŭropanoj tute ne kulpas pri la plimulto de la nunaj oficialaj pragmatismaj land- (aŭ ŝtat-) limoj. Eŭropo semis drataron tra la planedo, disigante kaj disŝirante pacegajn kulturojn, kaj luktigis fratojn pro monaj, ne vere pragmatismaj interesoj.

Ankaŭ mi timas la "kapricajn decidojn" de "etmensaj ŝovinistoj", sed ankaŭ tiujn fare de kiuj regas multajn ŝtatajn ("memstarajn", laŭ la sveda amiko) registarojn agnoskitajn de UN, ĉar ili bedaŭrinde povas malaperigi multajn senŝtatajn (tamen memstarajn) kulturojn kaj lingvojn. Multfoje la ŝtatoj kaj la registaroj naskas "egoismajn (purigajn) ideologiojn" kontraŭ malmitemaj senŝtataj kulturoj.

Franz Schönberg, Katalunio



# Infanoj en milito: nova etika bezono

**E**n la 1990-aj la mondo staras antaŭ gravega demando pri la protektado de infanoj en milito.

Unuflanke ŝajnas, ke okazas alarma retroiro. En pasintaj epokoj la ĉefaj viktimoj de militoj estis soldatoj. Ne plu. Nur en la lasta jardeko, proksimume 1,5 milionoj da infanoj estis murditaj en armitaj konfliktoj. Pliaj 4 milionoj estis invalidigitaj, kripligitaj, blindigitaj, mensdamaĝitaj. Minimume 5 milionoj iĝis rifuĝintoj, kaj 12 milionoj pliaj estis forŝiritaj de sia komunumo. Pli granda nombro vidis sian sanon, nutradon kaj edukon suferi kiam konfliktoj detruis rikoltojn, infrastrukturon, malsanulejojn, lernejojn.

Plej laste, seksperforto de knabinoj estis sisteme uzata kiel militilo en eksa Jugoslavio. Kaj en multaj partoj de la mondo, infanoj estis torturataj kaj devigataj rigardi aŭ partopreni barbaraĵojn. Centoj da miloj estis kripligitaj de minoj. Multaj pliaj estis varbitaj por armeoj, aliajn oni narkotis, armis kaj sensentigis pri aliĝo sufero. Nenombreblaj milionoj, da tiaj ĉi junaj homoj suferas pri posttraŭmataj streĉ-malordoj, nova kaj frostiga termino de la internacia leksikono.

Fronte al tioma senprecedenca nombro da tiaj raportoj ŝajnas prave konkludi, ke la ŝildo de civilizo neniam antaŭe montriĝis tiel fragila.

Aliflanke, estas ankaŭ kelkaj signoj de nova akordo por protekti infanojn de la plej teruraj malbonaĵoj, kiujn la adulta mondo trudas. La intensa diskonigo de kruelaĵoj koncernantaj infanojn estas en si mem ekzemplo, kiel respondeca la tutmonda publiko sentas sin kaj kiel rapide kreskas la nombro de neregistaraj organizaĵoj, en ĉiuj landoj, kiuj laboradas por preventi misuzon de infanoj en milito kaj por doni helpon al tiuj jam viktimitaj.

La Deklaro subskribita de la mondaj politikaj gvidantoj dum la Monda Pintkonferenco pri Infanoj okazinta en 1990 specife petis, "ke periodoj de trankvileco kaj tute aparte la 'pac-koridoroj' estu observataj por la bono de la infanoj, kie milito kaj perforto ankoraŭ okazas". Ankaŭ en la 1990-aj, nova kadro por ĉiaj tiaj streboj aperis sub la formo de la Konvencioj pri la Rajtoj de la Infano. Ili enhavas specifajn direktivojn por la protektado de geknaboj en armitaj konfliktoj tiel kiel proklamas la rajtoj de la infanoj. En siaj unuaj kvar jaroj, la Konvencio estis ratifikita de proksimume 150 registaroj. Neniu alia homrajta konvencio iam ajn tiel rapidis al la unua ŝtupo. UNICEF esperas, ke ĝis 1995 la Konvencio estos ratifikita de ĉiuj 148 membroj de Unuiĝintaj Nacioj — fiksante tiel normon por la pluvivo, protekto kaj disvolvado de infanoj. Ne respekti ĝin devas esti motivo de honto por kiu ajn nacio.

En la lastaj jaroj, tiu ĉi naskiĝanta movado komencis atingi konkretajn rezultojn. Ekaginte per "la tagoj de trankvilo", kiuj permesis al infanoj el Salvadoro esti imunigitaj en diversaj tagoj de ĉiu jaro dum la civila milito, plivastiĝis la ideo, ke dum militaj tempoj ĉiuj partioj devas interkonsenti pri la protekto de infanoj. La tagoj de nacia vakcinado en Libano kaj la "pac-koridoroj" dum la pafaĉo en Sudano estas aliaj ekzemploj, ke tiu ĉi embria principo ekefektiviĝas, samkiel estis la streboj por trovi la plej bazajn bezonojn de infanoj ĉe la apogeo de la Golfa Milito kaj en la plej malhelaj tagoj de Sarajevo.

Kiel ĉe ĉiuj tiaj principoj, ties enveno en la realan mondon estis realigita pere de du paŝoj antaŭen kaj unu malantaŭen. Kaj tia progreso povas esti konservata nur per laŭtvoĉa kaj insista postulo publika.